¿Debe no estudiarse este idioma, en espera de que se invente otro más perfecto? A esto se puede contestar con esta otra pregunta, que viene como anillo al dedo. ¿Debemos dejar de usar el ferrocarril como medio de locomoción, estando á punto á ser próxima la navegación aérea?

Aprendamos, pues, el Esperanto, que ya ha hecho sus pruebas en los Congresos, en la ciencia, en el comercio, en la industria y hasta en la literatura.

Román Ayca

(De *La Correspondencia de España.*)

(1) La j equivale á la y española.

DIVERSAJ SCIIGOJ

LA SEPA

La Sepo por la Sepa petas ke la gekongresanoj senprokraste rezervigu siajn dum dambrojn 5 sinsekvaj tagoj kun la rajto resti pli longe proporcie je la sama prezo. Por dambro kaj 3 mangoj diutage dum 5 tagoj ili devos pagi:

1.ª	Klaso: maksimume	30	Sm.
2.ª	— —	20	—
3.ª	— —	15	—
4.ª	— —	12	—

Por dambro kaj matenmangxo dum 5 tagoj, la prezoj estas:

1.ª	Klaso: maksimume	20	Sm.
2.ª	— —	15	—
3.ª	— —	10	—
4.ª	— —	7	—

Neces estas skribi la tagon, se ebl' horon, de la alveno. Ĉiuj kongresanoj matenmanĝos en sia hotelo, sed la plimulto tag-kaj vespermanĝos alilloke. Oni bonvolu sendi la maksimuman sumon de la elektita klaso al la Sekr-Kasisto de la Sepa; la eventuale tro mono estos repagata en la akceptejo, kie ĉiuj donantaj la rajtiloj por la hoteloj (ili ne estas sendataj poste).

Gis nun estas 525 aligxoj

***

ESPERANTISTAJ POSTOFICISTOJ

Antaŭ kelka tempo fondis intern. Ligon (nun Esp.-ia Entreprenoj, kiu havas kiel oficialan organon «Poŝta Esperantisto» (aldono de «La Esperantisto»). La kotiz. estas 1 Sm., kun la gazeto. S-ro Schmidt (Herbertstr, 23, Dresden) estas provizora prez.

***

ESPERANTISTAJ VENDREDOJ

Kvankam ne anonciata, la pasinta Vendredon okazis la kutimita kunveno de la Grupo «Semo» car multaj samideanoj ne sciante tion, honorigis per sia ĉeesto tiujn ciusemajnajn kunsidojn.

Oni pritraktis la saman aferon diskutitan en la antaŭa semajno, kaj la paroladintoj Sroj. Pujulá, Albiñana, Nin, Bermúdez, Pord s, Mua, kaj aliaj kies nomojn ni bedaŭras ne rememoras, esprimis siajn opinijojn favorajn al aliĝo de ĉiuj la Barcelonaj Esperantistoj al la ĉefa kaj plej malvasta Socieco en nia urbo, «Espero Katalunaj»; ĉiuj la ĉeestintoj kunsentis ke ĝi estas la plej oportuna kaj deca solvo al nia situacio.

Ni bedaŭras ke por bone difini la aferon, oni nepre bezonas ke ĉiuj la gesamideanoj sendu al «Grupo Semo» Ar. E. P. po tiparte aŭ letere, siajn opinijojn kaj ili estos legotaj dum la kunveno de la venonta Esperantista Vendredo; tiuj respondoj estos ankaŭ akceptitaj, unu horo antaŭ la komenco de la kunsido.

Ni petegas la nepran ĉeeston de ĉiuj la gesamideanoj kaj la sendon de sia opinio pri tiu grava afero.

Samideanoj! «Unueco foras for.on»!

GRUPO "SEMO"

Ateneo Enciclopédico Pupular

(Carmen, 30, principal)

Morgaŭ: *Grava kunsido*

CENTRA KOMITATO

El próximo sábado día 15 del corriente á las diez de la noche, tendrá lugar una reunión de delegados de la C. K. en el local de el Grupo Superal (Muntaner, 6).

Se ruega encarecidamente la puntual asistencia de representantes de todas las entidades esperantistas de esta ciudad, por tenerse que tratar asuntos de gran importancia para el Esperantismo barcelonés. —El secretario, J. Blandi.

ESPERANTO KAJ PATRUJO

Correu Vell, 5, principal

Aquesta Entitat, posa en coneiximent dels asistents a la excursió al Laberinto, que a posat a la venta les postals ab fotografics de dita excursió, al preu de 0,25 pesetas una.

SOPAR ESPERANTISTA

Per coincidir la data en que celebrem nostre sopar mensual ab la del Congrés qui té lloc a Reus, i essent molts els esperantistes de Barcelona qui ab tal motiu aniran a Reus els dies 15, 16 i 17 no's celebrará l sopar Esperantista corresponent al mes actual.

CERVELLÓ

Resultó muy brillante la semanada fies ta esperantista de esta villa, á la qual en tiempo [illegible]

El **GENERAL SEBERT,** membre de l'Academia de Ciencies de París, ès el vic-president de la **Internacia Solenca Asocio Esperantista.**

ESPERANTA RUBRIKO ★ DE LA PUBLICIDAD

NUMERO 28.ª

BARCELONO-20-IV-1911

PLENA SUKCESO

Ela partopreno en la Kataluna Kongreso de Ateneoj

Kiel ni anoncis en la antaŭa numero, okazis dum la dimanĉo kaj lundo lastpasintaj la unua Kataluna Kongreso de la Ateneoj kaj kulturasocioj en nia lando. La celo de tiu grava Kongreso estis difini kaj klarigi la konduton kaj agadon de niaj kulturasocioj por pleje efiki.

Ĝi konsistis el multaj sekcioj inter kiuj estis atentinda la prilingva kaj per kiu partoprenis la Kongreson ni la Esperantistoj aŭdigis la voĉon Esperantistan nia pioniro Sro. Fred. Pujulá kaj Delfí Dalmau el Barcelono kaj Enric Aguadé el Reus. La respektivaj temoj pritraktitaj estis laŭjene anoncitaj:

Kunlaboro de la kulturasocioj por la disvastigo kaj oficialigo de unu lingvo internacia: la plej bona Esperanto.

Kaŭzoj de la definitiva sukceso de Esperanto. Deca partopreno de la Asocioj en la Esperantistan movadon.

Propagado de Esperanto per la Asocioj

Ĉiu pritraktis aplaŭdinde la respektivan temon, precipe S-ro. Pujulá kiu faris multvaloran kaj elokventegan paroladon. Sed ĉar sama estas la celo de ĉiuj tiujtemoj oni kunfandis la konkludojn en tiun tekston:

«La Kongreso decidas ke la ateneoj kaj ĉiuj kulturasocioj en katalunujo kontribuu al la disvastigo de Esperanto kaj al la tasko kiun oni ĉie faras por la oficialigo de Esperanto en la internaciaj rilatoj»

Tiu ĉi konkludo estis unuanime aprobata.

Sed, ne finiĝis ankoraŭ per tiu decido de la Kongreso kiu ja estas grava sukceso de Esperanto, nia tasko kaj partopreno. Vespere kunvenis en la grandan teatron de la «Centre de Cultura» ĉiuj kongresanoj (ĉir kaŭ 500) de ĉiu kcioj, kaj granda amaso de Reus, anoj por ŭskulti du paroladojn unu tre grava filozofa aj socia pri kulturo de D-ro. Queraltó kaj alia e nia klera pioniro Sro. Pujulá, pri internaciiso kaj Esperanto. Nia honorinda samideano aj amiko Pujulá faris tiel inspirplenan kaj elokventan paroladon ke li tuta aŭskultantaro ntuziasme aplaŭdegis por ĝi, kaj tuj nia amiko aj Esperanto instruanto en Reus, Sro. Aguadé stis multe vizitata, de siaj samurbanoj, demane pri nova kurso de Esperanto.

Ja el ne decas komentarioj por vidigi nian ĝiritan sukceson.

El nostre Congrés a Tarragona

Ben falagueres con les noves qu'hem pogut recullir a Reus, aquest darrers dies, sobre'l nostre próxim Congrés. Allí hem tingut l'honor de saludar personalment al company Roig, secretari del Comité local organisador del Congrés, qui ens ha explicat el gran entusiasme ab que'ns esperen els tarragonins. Com a dato més important dels que'ns va citar el senyor Roig, podem dir que'l Congrés català esperantista a Tarragona está patrocinat per un Comité honorari format per las autoritats d'aquella ciutat, per tots els presidents de societats i directors de tots els periódics de Tarragona.

Además, s'organisen també una serie de conferencies de les quals se n'encarregarán als primers esperantistes de Catalunya, conferencies de propaganda del idioma internacional que donarán públiques qualques setmanes avants del Congrés.

En fi, que'ls nostres samideanoj de Tarragona es volen lluir per la seva activitat i zel. Rebán la nostra sincera expressió d'elogi els senyors Molas, Roig i altres actius samideanoj de la histórica Tarragona.

Sembla que degut a la inicativa del Excursionisme Marítim, es flotará un vapor de Barcelona. Nosaltres procurarem tenir ben informats als llegidors; farem lo possible pera que resulti lo més oportú i agradable la nostra anada a Tarragona, sempre fits nostres ulls al profit de nostra causa.

LA LITERATURA KONKURSO

(Aldono)

«Barcelona Stelo» prezentas premion al literatura verko kiu verkita kiel eble plej bone en Esperanto estos pli multvalora je literatura vidpunkto laŭ la decido de la kompetenta juĝantaro elektita de K. E. F.

Havena Propaganda Sekcio de "Kataluna Esperantisto"

Es ja una bella realitat la creació de la Marista Komisiono, efecte de la ponencia que va presentar en el primer Congrés de K. E. F., á Sabadell l'any passat, el nostre distingit amic senyor Fred. Pujulá.

Está organisada com a Havena Propaganda Sekcio del periódic «Kataluna Esperantisto» el qual en son número darrer porta una detallada informació de cóm funcionará en relació ab la «Marista Esperan- [illegible] Internacia» i els delegats d'aquella [illegible] ger.

[illegible] el nostre reduít espai no'ns pe[illegible] senyar com voldriem la Havena P[illegible]ganda Sekcio del «Kataluna Esperantisto» pera fer veure la gran importancia que tindrá i el concurs decidit que tots li hem de prestar i qui consisteix en lo següent:

Kompreneble tia propagando postulas monon. Se ĉiu esperantisto en nia lando donus al ni nur unu soldon (5 centimojn) ni havus monon sufiĉan por fari dum unu jaro saman propagandon en la ŝipojn de ĉiu ajn nacio vizitantajn nian havenon. Ni devas kompreni, ke ju pli estos Esperanto disvastigita de la fremduloj des pli ni profitos el ĝi: kun niaj samlandanoj ni ja bone interkompreniĝas per kataluna lingvo! Donu do monon por tiu propagando al la delegito de la Federacio en via urbo; donu al li soldon ĉiu monate. Kolektu soldojn de la kursoj, de la kluboj, dum viaj ludoj; starigu soldpunon pagotan, dum viaj esperantaj interparoladoj, de tiu, kiu uzos nekorektan esprimon aŭ neesperantan vorton. Pensu, ke per la soldo, kiun vi donacos, oni aĉetos ŝlosilon, kaj ke tiu ŝlosilo eble alilogos al ni homon utilan al nia Ideo. Ni ne ŝparu la semojn sur la homaran kampon. Por facile ligi la kontrolon de la soldkolektado oni presigis biletaron, kiujn oni sendos al la delegitoj de la Federacio kaj al la profesoroj, kiuj mendos ilin.

Kiu lernanto rifuzos unu soldon ĉiumonate al sia profesoro?

Kiu bona esperantisto ne aĉetos almenaŭ unu bileton ĉiumonate?

La propagando al fremdelo estas plej efika ol al samlandano.

Memoru la proverbojn: «Nenlu estas profeto en sia urbeto» kaj «Propra supo brogas, fremda allogas».

F. Pujulá

***

Preguém als senyors delegats i professors que vulguin recollir sóus per aquesta propaganda, se serveixin demanar a la Redacció del *Kataluna Esperantisto*, C. Gracia, 12, Sabadell.

Aquets talonaris, dels quals cada full val cinc céntims, són una garantía pel qui paga i pel qui demana.

S'enviin els diners en sagells de correu de cinc céntims.

Els senyors que hagin recollit diners, si a l'enviar-los no poden o no volen pagar les despeses de correspondencia, poden descomptarlos de la quantitat que enviin.

DIVERSAJ SCIIGOJ

Nuevo curso

El día 20 del corriente, en «Espero Kataluna» (Tallers, 81), se inaugurará un curso gratuito del idioma internacional Esperanto, cuyas clases seguirán dándose los lunes y jueves por el profesor señor Rosals, de nueve y media á diez y media de la noche.

***

ESPERANTISTAJ VENDREDOJ

Laŭ oni anoncis redaktoris la temon de la antaŭa vendredo.

Oni legis leteron de la enurba grupo «Aŭroro» kies anoj sin plendas de la konkludoj akceptitaj en la antaŭa kunveno.

Sro. Albiñana proponas ke oni publikigu alvokon direktitan al ĉiuj la prezidantoj de grupoj, petante al ili ke komuniku al la anoj de la respektivaj grupoj la bezonon starigi nur unu socieron.

La diskutado poste flankiĝis lomete de la temo, kaj kiel por sprimi ĉiujn detalojn estas bezona multe pli da loko ol la de ni disponebla, ni nin limigos indiki la nomojn de l'parto preninto, kiuj estas Sroj. Bremon, Albiñana, González, Bermúdez, Muga, Bordas kaj aliaj restinte por paroli la venonta vendredo Sro. Aubeyzon.

***

Ni opinias ke aranĝi solan socieron ne estas tiel malfacile kiel oni supozas; Parizo, Londono, kaj multaj aliaj urboj pli grandaj ol Barcelono havas nur unu socieron kaj laŭni por atingi nian celon bezonas nur kopii tiujn societojn

GRUPO "SEMO"

Ateneo Enciclopédico Pupular

(Carmen, 30, principal)

Daurigo de la antaŭa temo

***

Al la Prezidantoj de Grupoj en Barcelono

En la lasta kunsido kiu okazis en la Grupo Semo oni decidis sciigi la prezidantojn de Grupoj, pri la jeno:

Oni ĝis nun diskutadis pri la krizo de la Esperantistaro en nia urbo kaj ankaŭ pri la malbona organizado kiu nin regas, tio estas, ke ni havas la maleblecon agi kune ĉar ĉiu Grupo laŭiras malsaman rojon kaj ne ekzistas la konstantan interrilaton kiu estas necesa interni: devas ekzisti komunan direktadon.

Sed en tiaj diskutadoj partoprenis kelke da estimindaj samideanoj kiuj esprimis nur siajn privatajn opiniojn pri la afero. Nun estas necese ke ni aŭdu la voĉon kaj konu la opinion oficialan de ĉiu prezidanto de Grupo, ĉar oni devas fari jam ion praktikan. La opinioj de ili estas gravaj kaj povas, definitive, decidi la konkludon.

Tial ni esperas ke vi, indaj samideanoj honorigos la venontan Esperantistan Vendredon (21-an de la nuna monato) per via ĉeesto kun plenaj rajtoj por paroli absolute en la nomo de la Grupo reprezentata.

La Prezidinto de la lasta, *Kunsido*.

***

PAROLADOJ

Ni jus ricevis serion de pli ol cent kilojn montrantajn vidaĵojn el Antverpeno, kiujn sendis al ni la Urbestraro de la urbo de la «Sepa» kiuj taŭgos por la ilustrigi diversajn paroladojn okazontajn ĉe la sidejo de nia grupo «Semo» A. E. P. (Carmen 30).

La suprediritaj paroladoj estos faritaj de la klera samideano Sro. Fred. Pujulá kaj la inaŭguro okazos post ne longe.

***

CURSOS

«Novan Vojon», grupo esperantista del Ateneo Pi y Margall (Barceloneta), da dos cursos del idioma Esperanto los miércoles y viernes.

Es de recomendar á todas las personas interesadas en el progreso y cultura, aprovechan esta ocasión para aprender el hermoso é interesante idioma internacional.

***

ESPERANTAJ PRESLITEROJ

Ekstrakto el la specimenaro de Deberny kaj K-io, 58 rue d'Hauteville, Parizo. Malamikoj de Esperanto ofte asertas, ke ĝi ne estas facile presebla loke, aŭ ke pro manko de la specialaj literspecoj ĝin presigi estas tre multekoste. Kontraŭ tia diro, fondistoj, kun specimenoj de 89 diversaj specoj kaj grandecoj de Esperantaj literspecoj, liveros plej efikan rabaton. Petu ĉe la firmo ekzemplerojn senpagan.

***

CENTRA KOMITATO

Segane varem anoncias varen reunuiĝos ĵi tiu 15 ĉi diversos delegats que forman Centra Komitato cambiant impresiónes.

MANTEGAZZA, l'illustre president de la Societat Antropológica i senador italiá **era esperantista.**

ESPERANTA RUBRIKO ★ DE LA PUBLICIDAD

NUMERO 29.ª — BARCELONO-27-IV-1911

"PRI KELKAJ HISPANAJ AFEROJ"

Aquest es el títol d'un hermós treball qu'una distingida samideanino escocesa qui s'amaga sota el pseudónim de *Ota* va llegir en el grupo esperantista de Glasgow.

Com que no estem acostumats a sentir parlar 'al extranger de cosas d'Espanya ab tanta veracitat, y pensant qu' a nostres llegidors els interessará saber quins conceptes s'en formen de aquestes terres, fora de case, a continuació retallem els principals fragments d'aquesta conferencia ja que per falta de lloc no'ns es posible donarla a conèixer íntegra:

.....

«Pro tio ke Hispanlando estas tre vasta, gia klimato ne estas cie tute egala, sed la de Katalunujo estas «ciel» perfekta Kiam mi vin diras, ke en meza vintro oni povas havi la fenestrojn tute malfermitaj, vi povas imagi kia bona klimato estas gnata tie. Eĉ kvankam matene kaj vespere estas iom malvarmete, dum la tuta tago 'a sune brilas kiel en mez-somero, kaj escepte, eble, unu-du-foje monate, neniam pluvas. Sed, ĝiam pluvas, vere kaj certe pluvegas: sed pluvegas, kaj ĉesigas: ne estas kiel en Glasgovo, kie oftege pluvas—eĉ kelkfoje pluvetegas—sed ne ofte «ĉesigas».

En Barcelono estas preskaŭ nekonata la nebulo (la Glasgovanoj vere scias estimi tiun mankon!) kiel ankaŭ estas tre neofta la negfalo. Kelkfoje, kvarjare aŭ kvinjare eble, falas iom da neĝo, kaj kiam tio okazas, multaj personoj iras al la kamparo por ĝui la malofte vidatan okazajon, kaj multaj el ili faras fotografajojn de la neĝbeligitaj domeroj kaj pejzaĝoj, antaŭ ol la suno denove bri'u kaj fluidigu la neĝon. Unuvorte, la temperaturo malofte defalas sub o gradoj en vintro, kaj ne ofte superas 23 en somero. Estas bonega vintra loĝejo, kaj eĉ kvankam dum Julio kaj Aŭgusto oni sin sentas iom varmega, tio estas preferebla—ĝajnas al mi—ol kiam oni sin sentas tro malvarma, kiel ni ofte nin sentas tie ĉi-eĉ dum la somero!

Pro diversaj motivoj Katalunujo meritas atentojn de ni, Skotoj kaj Esperantistoj. Kiel ni scias, tie estis elpensata kaj priskribata de eminenta Kataluno, Aribau, la ideo de internacia lingvo, antaŭ ol Esperanto estis vere kreita. Poste, ni, kiel Esperantistoj, devus esti dankemegaj pro la bona kaj amema bonveno, kiun la Barcelonanoj donis al la «gesamideanoj» kiam okazis la Kvina Kongreso, kaj ĉar ili interesse sin okupis pri Nia Afero.

.....

Kaj ankaŭ, same kiel la Skotoj ne sin konsideras «Angloj», la Katalunoj ne sin konsideras «Hispanoj».

Pro mia propra sperto mi scias kiel treege malfacile estas konvinki la alilandanojn ke ni Skotoj ne estas «Angloj».

Kiammi estis *fremlande*, nenlu, neniam, nin nomis «Skotlino»: «ĉiam» mi estis «Anglo».

Mi neniam aŭdis ke estas «ĉiele» agrable al la Anglo], aŭ al la Irlandanoj, ke oni nomu ilin Skotoj»: sammaniere, do, okazas al la Skotoj kiam oni nomas ilin «Angloj»: kaj speciale al tiuj estas idoj de la Nordskotoj: cetere, estas ekskrete!

(En tiu-ĉi lando, la Nordskotoj estas tiuj kiuj montras multe diferencon de la Anglo.)

Tamen, en «tiuj» okazoj, ne konvenas klerigi kiel, kiel, kaj kiom diferencas la Angloj kaj la Skotoj: tiel, «anglo» mi *pisjofte* estis, ĝis kiam mi revenis sur britan teron, kiam mi denove iĝis «skota».

Sammaniere rilate al la Katalunoj: estas necese loĝadi en ilia lando por kompreni kiel ili diferencas de la aliaj anoj de Hispanlando.

Pro siaj karakterizajoj ili ankaŭ iom similas al la Skotoj: kaj ili—kiel ni—havas sian propran lingvon: sian propran literaturon; sian propran historion; siajn proprajn tradiciojn; kaj, mi ne scias ĉu, same kiel ni la Skotoj, ili ankaŭ havas siajn proprajn leĝojn.

La Katalunoj similas al ni pro sia lingvo, pro tio ke ĝi estas sufiĉe malfacila por lerni, kaj simile je la nia, estas nur nacianoj kiuj atingas ĝin paroli perfekte.

En Barcelono preskaŭ ĉiu parolas flue la du lingvojn hispanan kaj katalunan.

Katalunujo konsistas el kvar provincoj, nome: Barcelono, Tarragone, Lerdo kaj Gerono.

Barcelono, la urbo, sin trovas en Barcelono, la provinco: estas la ĉefurbo de Katalanujo, kaj la «komerca» ĉefurbo de tuta Hispanujo. Antaŭe, la nacio Katalunujo estis regno aparta; kaj plimalfrue, ĝi unuigis al la aliaj nacioj, kiuj nuntempe, kun ĝi, estas la hodiaŭa Hispanujo: tial, nature—same kiel ni—la Katalunoj tute ne volas perdi sian nacian rajtaron.

Ili estas tre fieraj pri sia belega ĉefurbo, kaj ili ĉiel rajtas tion, ĉar ĝi estas ja tre bela kaj tre alloga urbo.

Estas sur la tera globo multaj admirindaj ĉefurboj, sed oni diras ke Barcelono estas unu el la plej belaj».

Passa després la conferencianta a fer una comparació entre New-York y Barcelona y diu que si bé la primera de les ciutats anomenades s'imposa per les seves altíssimes y atrevides construccions, la nostra urbs es més hermosa—y continua:

«Laŭ sia arkitekturo kaj generalaj aspektoj ĝi similas Parizon aŭ Bruselon. Estas tute moderna urbo, kaj kune kun Madrido, ne estas mezepoka kiel multaj el la aliaj hispanaj urboj. Ĝi havas bonan servon da elektro-tramveturiloj, kaj la lumo elektra, kaj aliaj modernajoj estas ĉie trovebla j. Vi povas juĝi pri ĝia ĝishodiaĵeco kiam mi diras, ke mi havas libron de vidajoj de Barcelono—kiun oni sendis al mi la lastan printempon—kun la nomoj skribitaj en la franca, la germana, la angla, la hispana kaj la *Esperanta* lingvoj!»

(Daŭrigota)

L'Esperanto á l'extranger

QUALQUES NOVES

RUSSIA

Derkento (Caucas).—Durant un ball de mascares apareguè una senyoreta amb vestit personalitzant l'idea de l'Esperanto. Els esperantistes presents aprofitaren aquella ocasió per aclarir an el públic el significat i l'utilitat de la nostra llengua. L'original vestit obtingué un gran èxit i el primer premi del Concurs.

ANGLATERRA

Londres. Un nou progrés.—Esperanto entra com accessori en la literatura d'avui. En *Anton of the Alps*, de W. Victor Cook, novela sensacional que publica en folletí l'important diari de Londres *Morning Leader*, tot un capitol está dedicat a la visita que fa'l protagonista al Club anarquic esperantista de Milán. El mateix ja abans havia trobat un trog de paper amb una misteriosa inscripció en Esperanto.

ESTATS UNITS

New-York.—S'acaba de fundar una Fraternitat Esperantista Internacional d'Estudiants, l'objetiu de la qual es: Primer. Crear fraternals relacions entre els estudiants de tot el món per medi de la correspondencia. Según. Crear una lliga de estudiants de tots els paisos. Tercer. Divulgar la llengua Esperanto.

Cotisació anyal: 0,50 sm. igual 1,25 francs. Per a més detalls dirigir-se al secretari, Sr. A. P. Arnold. Ll. B. (24, St. Marks Place, New-York, U. S. A.).

ITALIA

Florença.—La Cambra de Comerç de aquesta població ha subvencionat amb 100 pessetes la societat esperantista, acompanyant una carta altament lloable pera la nostra llengua.

Genova.—A l'escola tecnica «Baliano», assisteixen a un curs vint professors de ambdós sexes, els quals se proposen, després, implantar l'Esperanto a les llurs respectives escoles.

Dum la tagoj 24ª kaj 25ª de la proksima junio okazos nia Kongreso en Tarragona. Gesamideanoj, pretighu!

DIVERSAJ SCIIGOJ

NIA LITERATURA KONKURSO

(Aldono)

La Grupo Semo de A. E. P. decidis premii la plej bonan «Kolekton de Katalunaj modismoj aŭ proverboj», tradukitaj en Esperantan lingvon.

La premio konsistas el arta arĝenta tabulo enhavonta la nomon del sukcesonto.

★

ESPERANTO KAJ PATRUJO

Lo propvinent diumenge dia 30 del corrent, aquesta entitat farà una excursió a la Font de l Mas Guimbau (Vallvidrera).

Punt de reunió: hatació de Sarriá (Plassa Catalunya), á les dugues i mitja de la tarde.

★

LA PROPAGANDISTO

Trimonata Propaganda Folieto, Organo de la Internacia Propagandejo Esperantista, 135, High Holborn, London, W. C. Jarabono: 200 spesoj (60 cént.).—En nia movado pli kaj pli multigas gazetoj, dedicataj al tiu aŭ alia speciala fako. Cis nun mankis tamen organo, dedicita speciale al la «arto» de la propagando. Tiun mankon celas forigi *La Propagandisto*. Alivorte, ĝi proponas, ke tiuj samideanoj, kiuj pro propra lerteco aŭ pro plioportuneco de cirkonstancoj jam trafis eminentajn rezultatojn propagandajn, ne lasu siajn ideojn ŝimiĝadi neuzate en la forloko aŭ sur la paĝoj de la *nacia* gaceto, sed per internacia elmontrejo de *La Propagandisto* metu siajn konsilojn kaj spertojn je la dispono de la tuta mondo. En bona artikolo ĝi klarigas praktikan programon kaj «celaron», je kiu ĉiu propagandisto povas kunhelpi. La diversaj interesaj artikoloj, nome, Propagandu dum via Libertempo, Imitindaj Ekzemploj, Fremdaj Profetoj, Moderna Babilona Turo, Esperanto kaj la Laboristaro, Esperanto kaj la Registaroj, La Angla Registaro kaj Esperanto, Ĉekbankaj Aferoj, k. t. p.—liveras al seriozaj legantoj fonton de imitindaj kaj plenumindaj ideoj: Ni kore rekomendas, ke ĉiu propagandisto abonu kaj helpu la novan organon por la praktika bono de la komuna afero. Oni petu tuj specimenan numeron!

★

AL ESPERANTISTAJ FIRMOJ

Tiujn firmojn kiuj korespondas Esperante oni petas ke sendu la nomojn kaj adresojn al Internacia Propagandejo Esperantista — 135, High Tolborn—Londres, W. C.

★

FERVOJA ESPERANTISTO

Dumonata Gazeto, Organo de la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj. Jara Abono 1 Sm. de S-ro Bontemps, stacidestro, Parennes (Sarthe), Francujo.—Inter homoj, kiuj povas plej multon fari por nia afero, estas certe kalkulindaj la fervojistoj. Por multaj el ili, almenaŭ en la grandaj stacidomoj de la pli gravaj linioj, interrilado kun alilanduloj estas kvazaŭ ĉiutaga afero. Se nia lingvo farigos generale uzata sur la fervojoj, multe plifaciligos la tasko de l' propagandisto. Ni do kun aparta plezuro atentigas pri la apero de ĉi tiu nova aliĝinto al la vicoj de nia specialista gazetaro. La enhavo montras, ke Esperanto jam bone progresas inter la fervojistoj, kaj la nombro de la sekretarioj kaj delegitoj kunigas samideanojn el dekstri diversaj landoj: Aŭstrio Hungarujo, Bulgarujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Granda Britujo, Holando, Japanujo, Norvegujo, Rusujo, Svedujo, Svisujo kaj Usono. Al la nova kunfrato koran bonvenon kaj daŭran sukcesonl

Fem que no hi manqui Catalunya!

★

ESPERANTISTAJ VENDREDOJ

La pasintan semajnon oni daŭrigis la diskutadon pri la temo kiu tiel interesis niajn Esperantistajn samurbanojn: Parolis Sroj. Albiñana, Bermúdez, Campdelacreu, Caparrós kaj aliaj esprimante siajn opiniojn pri la afero nomita.

Sro. Albiñana fine proponas ke «Espero Katalunа» prezentu programon kvazaŭ ĉefa aŭ centra societo, kaj tiel la samideanaro vidos se estas utila por nia celo aliĝi, aŭ ne, al «Espero Katalunа».

Sro. Campdelacreu, konsideras deca la antaŭa propono kaj opinias ke antaŭ malaperigi la nunajn societojn estas necesa ke «E. K.» prezentu programon, ĉar oni devas scii, ĉu la aliĝoj devos esti de la samideanoj private aŭ de la societoj kun ĝiaj apartena joj.

Oni konkludas ke Sro. Albiñana prezentu dokumenton la venontan vendredon je la senco de li esprimita por ke ĝi estu signota de la ĉeestontoj kiuj estos konformaj al tiu ideo.

Por aranĝi ion praktikan ni petegas de niaj samideanoj ĉeesti tiun kunsidon.

GRUPO "SEMO"

Ateneo Enciclopédico Pupular

(Carmen, 20, principal)

Morgaŭ Vendredo. Interdiskutado

★

AKADEMIO

La ligava komitato devas rebaloti trionon de la Akademianoj. La jenaj personoj eliris per tiu unua vico: S-roj Nylen, Boirac, Ellis, de Saussure, Villanueva. La kandidatoj por tiuj kvin lokoj estas la jenaj: S-roj Boirac, Čefeć, Christaller, Elb, Millidge, Nylen, de Saussure, Mis Šafer, P-ro Schmidt, Villanueva, Zakrzewski. Rezultatoj post la 1.ª de Aŭgusto.

★

POLICISTOJ KAJ ESPERANTO

Ekzistas nun policgrupoj en jenaj urboj: Dresdeno (70 membroj), Augsburgo (26), Chemnitz (25), Mainz (10), Parizo (27). Krom tio estas dum sukcesaj kursoj en Antverpeno. Ektimu la ŝtelistoj... per Esperanto!

★

TUTHINDA ANIARO DE PUBLIKIGISTOJ

Tiu societo, kiu jus aliĝis al U. E. A. kiel Esp-ia Entrepreno, celas propagandi Esp. ĉe la publikoficistoj, krei ligilon de amikeco inter la diverslandaj administraciuloj publikigi jaran liston por ke ĉiu samidcano sciu al kiu sin turni pri administraciaj aferoj, eldoni Esp-administracien vortaron. La jara kotizajo estas Sm. 0,40. (Sin turni al S-ro M. Doué, 10, rue Charles Divry, Paris, 14). La nombro de la membroj atingas nun 103 el 14 landoj.

★

VIZITA

El grupo esperantista Kulturo el diumenge dia 30, matí, farà una visita a l'Hospital de Sant Pau en lo qual convida a totes les societats Esperantistes y a totheus en general.

Lloc de reunió: Carrer de Anglesola, entre pasaig de Gracia, a les 9'30 y mitja matí.

El **Dr. G. GAUTHEROT,** laureado por la Academia Francesa y Profesor en la Universidad Católica de París, **es esperantista.**

ESPERANTA RUBRIKO ★ DE LA PUBLICIDAD

NUMERO 30.ª

BARCELONO-4-V-1911

SUROJE NOSTRE KONKURS LITERARA ESPERANTISTE

Interview interessant

El nostre Concurs Literari Esperantiste que ha organisat la Federació Esperantista Catalana ha de constituir un veritable acontaixement encare que no's considerés més que l'importancia qui li dona l'esser el primer que celebrem els catalans. Es aquesta també una de les causes de l'espectació qu' ha despertat i de l'especial atenció que hi ve fent Esperanto Rubriko de La Publicidad que sempre s'interessa pel curs de nostra causa a Catalunya especialment. Aixis es que fent l'altre dia 'l croniste una visita al distingit amic i president esperantiste D. Fred Pujulá i Vallés, va ferli aquesta pregunta: quina marxa porta 'l Concurs? que si no hagués sigut ell l'interrogat, l'interrogant hauria pogut preparella l'escusa de que 'l periodisme no és indiscreció ni altrament hi pregunta s'haguès considerat indiscreta. Però el senyor Pujulá es l'home més expansiu i franch que'l croniste hi conegut i aixis la nostra visita va, ben aviat, tornarse una interessant «interview» que pot concretarse com seguex:

¿Qué tal la marxa del Concurs?

—Va malament, car no hem rebut fins ara més que un treball.

...!?

—Es d'extranyar, car si bé 'ls temes son una mica difícils, hi ha molts esperantistes que tots coneixem, qui dominen molt bé l' esperanto, sense esser precisament els qui ja han publicat sens dubte per modestia qu'es la que ara fa no prenguin part en el Concurs, no tenint en compte que l'éxit del Concurs es l'éxit de tot l'esperantistaro catalá.

—No li sembla que 'l rigor o sinceritat ab que hem criticat qualques publicacións es la causa principal d'aquesta poca concorrencia al el Concurs?

—Si bé hem estat rigorosos al jutjar coses publicades ha sigut perque aquestes publicacións passen el limit de tota imperfecció; i per altra banda—afegí el senyor Pujulá—segons les conclusións del Concurs encare que se'ns cregui rigorosos, el nostre rigor en aquet cas no podrá aplicarse més que a la tria dels treballs, car sempre n'haurem de premiar un (el millor, naturalment) encare que no sigui del tot perfecte.

Heusaquí 'ls lluminosos conceptes vertits pel senyor Pujulá no sols ab l'autoritat que li dona son prestigi personal sino també com a membre del Jurat del Concurs.

Compatyst Pretiguéu part, tots, en el nostre primer Concurs Literari Esperantiste. No permeteu qu' hagi de sortir premiat qualque treball imperfecte per manca d'haverhi aparegut un de millor. Aquest ha de decidir la sort d'una continuació de Katalunaj Floraj Ludoj que devem ferlos un veritable exemple pera imposar universalment aquesta festa qu' ha d'arribar a ser l'espill de l'espiritualitat humana: de el respectiu temps, i gloria de Catalunya qui n'es el niu.

Delfi Delmau

***

NOVAJ TEMOJ

Artajo de la «Circulo de Tarragona» al plej bona verko taŭgonta kiel propagandilo de Esperanto kaj kiel hreloro por esti diskonata.

Artajo de la «Hotel Continental de Tarragona» al temo: «Bezono kunbeligi la turismon kaj Esperantismon».

Artajo de la «Patronato del Obrero de Tarragona» al temo: «Neceseco kaj sociaj utiloj liverantaj la katolikaj laboristaj Sindikatoj kaj influo de Esperanto por la monda disvatigo de tiaj Asocioj.»

Premio presentita de la «Federació Nacional d-Estudiants» al jena temo: Utileco de Esperanto por la Internaciaj Interlistoj de Studentoj.

La gazeto «Catalunya Nova» de Tarragona donos premion al plej bona traduko de la patrolade farita de Sres. Folch y Torres ce la fondo de la *Sindicat d'Iniciativa* y *Atracció de Forasters* de Tarragona kay publikigita sur la nomita gazeto la 4ª Decembron 1910.—Gin petu al la nomita gazeto.—

La grupo «Tarragono Esperanto» donos 25 pts. kiel akcesiton al la Natura Figaro.

Sro. direktoro de la «Institut de Tarragona» al pli bona tradukajo donos 25 pts. Libera temo. —Estas devigate kunigi la originalan verkon al la tradukajo (Ne estos jugata la manuskripto ne plenumanta tiun kondicon).

Grava aviso.—La templimo de partopreno estas prokrastita gis la 31ª Mayo.

La Homaro interkonsilighas

De F. J. Gould

Granda estas la fiereco historia de Londono. Grandaj ankaŭ estas giaj multspecaj tragedioj de mizero kaj malriĉeco. Tiun okazoplenan vivrakontoa distingos en la somero de ĉi tiu jaro (Julio 26-29) epizodo brilanta kaj senekzempla. En Londono interkonsiliĝos la homaro. El ĉiuj partoj de la terglobo kunvenos reprezentantoj de ĉiuj homaj grupoj kaj landoj, kiuj konas la Stelon de l' Poluso kaj regionoj, kiuj kuŝas sub la Suda Kruco, renkontan iros unu al alia, por amika interrilatiĝo en la Unua Universala Raskongreso. La homaro montros sian unuecon en diverseco, kaj popoloj, kies disiĝon rakontis la legendo pri la Turo Babilona, rekombiniĝos denove antaŭ la okuloj de la Dudeka Jarcento. La oficialaj lingvoj de la kongreso estos la angla, germana, itala kaj franca, kvankam eble orienta lingvo de tempo al tempo anoncos la animon de Azio. La referataro estos eldonata en du volumoj, unu tutfranca, unu tutangla. Ĉiuj aranĝoj pri tiu parlamento de la nacioj estas en la manoj de grandanombra kaj distingita Agada Reprezentantaro de multaj diversaj nuancoj de opinio.

Por la celoj de la ĉiutaga vivo ni povas oportune dividi la homaron en la blankan, la nigran kaj la flavan familiojn. La homa historio tuta rakontas la malĝojen rakonton pri iliaj malpacoj kaj jaluzoj; kaj la pli moderna historio rakontas ankaŭ pri vekiĝanta sento kaj kompreno de ilia unueco. La konscienco blanka, konsciĝante pri sia devo, vokas al la nigraj kaj flavaj fratoj pli intime konatiĝi, kaj fari el reciproka fido kaj reciproka helpo, iam virtoj de la malvasta hejma rondo, jam de nun virtoj de l' tuta planedo. El ĉiuj flankoj de la tero per flugiloj de simpatia sento alvenis respondoj — de kvindek naciaj de tridek prezidantoj de parlamentoj, de dekdu-britaj regestroj kaj preskaŭ sama nombro da britaj Ĉefministroj, de cent tridek profesoroj de internacia juro (kiuj, solaj, jam prezentus rimarkindan aliĝitaron), de pli ol kvardek kolonial episkopoj, kaj de pli ol cent dudek membroj de la Konstanta Kortumo de l' Arbitraĝo de la Dua Haga Konferenco. Ĉe la eniro de tiuj senditoj de l' Haga en la kongreson, facile fajnus al la imago de rigardanto, kvazaŭ la flugiloj de la Paco, glore levataj kiel ĉe la nobla figuro de la greka statuo de l' Venko, bene sin klinas super la heroldoj de homa frateco!

Kiu unue iniciatis al ĉi tiu kongreso? D-ro Adler, profesoro de l' Socia Etiko en la Columbia Universitato. La propono estis unuafoje prezentita en Eisenach en Julio, 1906. Se ideoj povus rerigardi al sia propara historio, ĉi tiu ideo ja rajtus sin gratuli pro tio, ke ĝi jam realigas en granda mendcentro nur kvin jarojn post sia naskiĝo. Tiu kunveno asertis, ke la moderna konscienco, kvankam jam pli sentema kaj forta, estas ankoraŭ mafforta internacie. Ĝi rapide farigadas pli vigla kaj atenta pri tio, kion oni nomas sociaj problemoj de la interna vivo de la komunumo, sed ĝi ankoraŭ ne povoscias, efike kaj potence entrepreni la solvadon de problemoj, kiujn naskas diverseco de raso. La agendon de la kongreso oni tiom post tiom ellaboris per la kunhelpado de multaj fakspertuloj. Kaj tre vasta oni ĝin ellaboris. Ĝi estas agendo de difinita pasinteco, kondukanta al klimakso de praktikaj kaj pozitivaj proponoj. Per la vorto «praktikaj» oni ne celas tiun rapideman provon por batali kun problemoj tuj solvotaj, tiaj, kiaj infoje eksCitas la deputitojn en la Parlamento en la «hore de l' demandado» aŭ ardigas la ĵurnalojn de la pasinta semajno. Ĉi tiu kongreso celas aferojn fundamentajn. La unua celo estas, kulturi reciprokan konatiĝon kaj respekton inter la okcidentaj kaj la orientaj popoloj. Necesege estas, ankaŭ, helpi agadon kaj pripensadon en du kardinalajn direktojn, traktante la okcidentanoja, en kunlingo ka kuntuŝo kun Hinuja, Japanuja, Turkuja, Persuja, Egiptuja kaj Indio, kiel apartan diavolvaĵon ununflanke, kaj aliflanke la amorfajn grupojn de neblankaj homoj submentataj al eŭropa aŭ amerikana regado.

La unuan noton en la kongresa harmonio—«Harmonio» volvita cirkaŭ terglobo estas la emblemo de la kongreso—sonigos hindo, Brajendra Nath Seal, estro de la Cooch-Behar Kolegio, kiu legos tezon pri la difino de la vortoj raso, gento kaj nacio. El la Oriento venas Lumoi Sed en ĉi tiu okazo, kiel en ĉiuj, oni devus diri pliĝuste, ke oni akceptos ĉiujn referatonojn kiel jam legitajn, kaj ke la vivanta voĉo de la kongreso sin okupos pri diskutado, ne pri legado, kaj ĉiu generala temo, ampleksante la diskutotaĵon por unu tuta kunsido, estos prezentata per dudekminuta parolado. La aĝestro de la estro de Cooch-Behar Kolegio rimarkigas al ni, ke la pretendojn kaj idealojn de ĉiu aparta orienta komunumo prezentos ĉiu kaze iu eminenta indiĝeno. La problemo de la rasegaleco, tamen, ampleksas ĉiujn sekciojn. Tute dece do estas, ke priparoli tiun temon devos la hon. organizinto de la kongreso, S-ro Gustave Spiller, kiu tiel fasigas, kiel Anarchasis Kloots oratore por la homaro.

Pli ol kvardek distingitaj eminentuloj konsentis prezenti referatojn, reprezentante pli ol dudek diversajn landojn, inter kiuj Hinujo, Japanujo, Indio, Turkujo, Persujo, Egiptujo, Suda kaj Okcidenta Afriko, Haitio, Usono, Granda Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Rusujo, Aŭstrio, Hungarujo, Belgujo, Holando, Danujo, kaj Norvegujo. Inter la verkintoj trovigas Sir Sydney Olivier (Registro de Jamajko). Sir Charles Bruce (eks-registro de Maŭricio), Sir John Macdonell (Estro de la Plejalta Kortumo), Sir Harry Johnston (la fama vojaĝisto), S-ro Israel Zangwill (kiu parolos pri la hebrea raso), F-ino Margaret Noble (Fratino Nivedita), krom eminentaj aliĝadeloj kiaj S-ro León Bourgeois (unu el la plej respektataj internacialistoj), Prof. Giuseppe Sergi (la konata antropologo), kaj D-ro Zamenhof. Oni ne povas tro atentigi, ke oni neniel intencas fari proponojn de speco politika. Tiaj tute forestos. Ĉiujn problemojn oni konsideros laŭ sen partia kaj afrigardo, traktos aparte de iaj malfacilaĵoj nur momentee aktualaj. En ĉi tiu konferenco, kiu celas la ĝeneralajn rilatojn inter la Okcidento kaj la Oriento, ne decos, ke eŭropaj reprezentantoj diskutu malpacigajn demandojn pri tiu aŭ alia eŭropa komunumo.

Alloga fako de la kongreso estos ekspozicio de libroj diversrasaj (religiaj kaj ne-religiaj), portretroj, kranioj, diagramoj, k.t.p.

Ĉeesti la kongreson rajtas ĉiu homo, kiu pagas aktivan membrecon, 10.50 Sm. (28 pesetojn). Pasiva membreco (eksKluzive de ĉeesto sed inkluzive de ĉiuj presaĵoj eldonitaj) kostas nur 3.750 Sm. (9 ptoln.) Esperebla la prezidanto, Lord Weardale, povos de la estrado cirkaŭrigardi al vasta kunvenintaro, kaj ke D-ro Adler (prezidanto de la Ĝenerala Komitato) scatos, ke lia ekpropono en Eisenach estis semo ĵetita sur bonan teron, destinita naski abunde da fruktoj de tutmonda amo.

Tradukis W. M.

***

Pri Servo, kiun povas fari la Esperantistaro

Ni kore petas al ĉiu samideano, kiu legos la suprepresitan artikolon, ke li aŭ si kiel eble plej multe diskonigu inter siaj amikoj la aludatan Raskongreson. La organizantoj tute favore rilatas al Esperanto, kaj deziras utiligi ĝian disvastigan potencon por penetrigi sciigojn pri la kongreso en tiujn landojn kaj regionojn, kiujn ne atingas la tri-kvarlingvaj cirkuleroj ĝis nun disponeblaj. La fakto, ke nia amata Majstro konsentis verki la ĉeftezon por la fako «Internacia Lingvo» jam en si mem montras, ke la kongreso indas la seriozan atenton kaj kunhelpadon de la tuta Esperantistaro. Ankaŭ la fakto, ke la organizantoj de tiel grava kongreso petis tiun servon al D-ro Zamenhof, estas signo de honoro kaj konfido al nia tuta movado, kiun ĉiu samideano devus pravigi laŭ ebleco per persona kunservado. Kiel? Kredeble nur malmultaj povas fariĝi aktivaj membroj, sed sufiĉe multaj (ankaŭ Esperantistaj grupoj kaj precipe la naciaj societoj) povus aliĝi kiel pasivaj membroj, kaj «ĉiu povus peti per Esperanta poŝtkarto al la Sekretario (S-ro. G. Spiller, *63, Southhill-park, Hampstead, Londono*) prospektan flugfolion. Multaj ankaŭ povus servi per tradukado aŭ resumado kaj presigado de la artikolo en naciaj lokaj ĵurnaloj. Aliaj povus helpi pri la ekspozicio, sendante plej baldaŭ al Prof. A. C. Haddon, Sc. D., F. R. S., ĉe la Sekretario, bonajn fotografaĵojn de la plej eminentaj personoj en sia lando, ankaŭ de tipaj kutimoj, festoj, pejzaĝoj kaj arkitektaturo arto. Kaj plej multe povus helpi la redaktoroj de Esperantistaj gazetoj, atentigante pri la afero en sian legantaron! Per tiuj simplaj rimedoj oni montros la intereson, kiun sentas Esperantistoj pri grava kvazaŭ-Esperantisma mondkongreso, kaj ni akiros al nia kara lingvo la saton kaj aliĝon de tiu eminenta internacia specialistoj, por kiuj ĝi pli ol por ĉiuj aliaj utilas, kiuj pli ol ĉiuj aliaj konstatas ĝian necesegecon. Ni pretendas kaj scias, ke Esperanto havas miriadan diskonigan kapablon: ĉi tie ni havas oportunan okazon, por tiom eminentuloj al tre eminenta sekcio de la internacia ... ol Ni memoru, tamen, ke nia celo, en ... kaj similaj okazoj, devus estiĝi ne por tiel ... ekspluati la kongreson por antaŭenigi Esperanton, sed precipe per Esperanto servi kaj antaŭenhelpi la kongreson. Se sufiĉe da Esperantistoj ĉeestos, oni povos havi specialan kunvenon.—W. Mann.

DIVERSAJ SCIIGOJ

ESPERANTISTAJ VENDREDOJ

Laŭ la konkludo de la antaŭpasinta vendredo, Sro. Albiñana prezentis kaj legis en la lasta kunveno dokumenton kvazaŭ programo kiun devas solvir la Barcelonaj Esperantistoj por starigi la solan societon aliĝante al «Espero Katalunа».

Kelkaj samideanoj rifuzis subskribi tiun dokumenton kiel programon, sed tion faris, kiel alvokon al ĝenerala kunveno, kaj por aranĝi tiun aldonis kelkajn liniojn laŭ tiu ĉi senco.

Ĉiuj la ĉeestintoj subskribis la suprediritan alvokon kiu estos publikigata en «Esperanta Rubriko» la venontan jaŭdon.

Ni rekomendas al ĉiuj kiuj interesiĝas pri tia grava afero, bonvolu iri ĉe la Grupo «Semo» por aliĝi per sia subskribo al tiu ideo.

***

ANTVERPENO-LA URBO DE LA SEPA

La proksima Esperantista vendredo konsistos el parolado kun lumbildaj pro el ĉioj pri la bela urbo de la sepa kiun faros nia agema samideano Sro. Fred. Pujulá i Vallés.

La Urbestraro de Antverpeno tre afable sendis al ni belegajn vidajkliŝojn per kiuj la Barcelonaj Esperantistoj povos juĝi la mirindaĵojn kiujn enhavas tiu urbo.

Ni pasigis niajn rigardojn tra tiu rica kolektaro de artaj vidaĵoj kaj ni povis konstati ke la feliĉaj kongresanoj kiuj vizitos Antverpenon dum la sepa kongreso multe ĝuos pri la beleco de ĝiaj konstruaĵoj.

Inter ĉiuj kiuj estas interesataj serio rilatanta al la mondfama kaj grava Haveno, kun ĝiaj potencaj levigiloj de diversaj sistemoj, ĝiaj longaj kaj vastaj kajoj kaj ĝiaj grandaj Casenoj, unu vorte, ĉiuj progresaj maraj konstruaĵoj kiuj bezonas la graveco de komerca movado.

Ni estas certaj ke la ĉeestontoj al tiu konferenco pasigos agrablan tempon vidante tion kaj aŭdante samtempe la klarajn informojn de nia pionira Sro. Pujulá.

GRUPO "SEMO"

Ateneo Enciclopédico Popular

(Carmen, 30, principal)

Morgaŭ: Parolado pri «Antverpeno, la urbo de la Sepa», de Fred. Pujulá.

***

LA GRUPO ESPERANTISTA "LIBERO"

Sciigas al ĉiuj la gesamideanoj, ĝian traloĝigon, al strato. Poniente, 24, 2.°

***

AVIRO AL LA HISPANA ESPERANTISTARO

De nia amiko Sro. J. Gili ni ricevis la jenan letoron:

Tre karaj kaj estimataj gesamideanoj: Anoncinte mi ke estis aparta verko nomat «Pešvortaro» kelkaj esperantistoj kun antaŭa pago decidis ĝia akiri kaj car mia volo estis ilin kompliezi por ne senpaciencigi pro la troa prokrasto, mi sendis al ili la unuajn eksemplerojn ne ankoraŭ tute finitajn kaj malgraŭ mi volo ili enhavis preseraroj. Car ĉiuj eksemploroj ne aperis oficiale, do, male, mi unue kaj antaŭ ĉio estus sendinta al la Esperantista gazetaro de nia lando, sed nur dume, mi havas la honoron sciigi ĉiujn Esperantistojn posedantajn la verkon, ke tiuj previdemaj eksemploroj estas fingo-taj per aliaj tute plenaj.

A. Tudurí

San Sebastián-April-1911.

Gesamideanoj! Pretighu por la II.ª Kataluna Esperantista Kongreso okazonta en Tarragona dum la 24.ª kaj 25.ª de Junio.